RATKAPTISTA KURIERO

INFORMILO DE LA RATKAPTISTA BANDO

NUMERO 22 JULIO 1999

Voraussichtliche

Termine 1999

(2. Halbjahr)
Freitags in der Sumpfblume
um 19.00 Uhr:

3.9. + 24.9. 15.10.
12.11. + 26.11.
17.12.1999 14.1.2000

Planitaj temoj kaj programeroj: rigardi „Mazi"-videofilmon, aûskulti raportoj pri la UKo en Berlino, pri la KISo en Marburg kaj pri la BARo en Bad Münder, kanti kune, legi tekstojn, librojn, poemojn, viziti la grupojn en Hildesheim kaj Hannover, celebri adventan vesperon kun kandeloj kaj keksoj, babili kaj ĝui la renkontiĝojn, ktp. .....

Vizitu la Berlinan Arbaran Renkontiĝon en Bad Münder de la 8-a ĝis la 13-a de septembro !!!!!

Und noch ein kleines Gedicht - kaj ankoraû mallonga poemo:

Johann Wolfgang Goethe

Elfreĝo

Kiu rajdas tra l'nokt' kaj vent' sub nub'?
Ĝi estas patro kun sia bub'.
Li premas filon per brak' al sin'
kaj firme, varme li tenas lin.

Filet', vi kial vin kaŝas kun trem'?
Patret', ja venas elfreĝo mem!
Elfreĝ kun kron', trenaĵ' post li! -
Filet', ĝi estas nebul-stri'.

„Ho venu do, infan', kun mi!
Tre belajn ludojn ludos nun ni.
Sur bordo brilas la bunta flor';
mia panjo havas vestojn el or'."

Patret', ĉu vi aûdas, elfreĝo sen ĉes'
min vokas, logas per flustra promes'. -

Fileto, restu do en kviet',
tra l' velkaj branĉoj zumas ventet'.

„Ho, ĉarma knabo, do venu jam,
la filinoj vartos ja vin kun am'.
La filinoj nokte en ringo de danc'
vin lulos per kanto kaj danc' kaj balanc'."

Patret', ĉu vi aûdas, jen ŝvebas kun vok'
elfreĝidinoj en nigra lok'. -
Filet', filet', mi vidas sen dub':
maljunaj salikoj grizas en grup'.

„Mi amas vin, ho bela figur', kun sopir',
se mem vi ne venos, do prenu vin ŝir'."
Patret', ho patret', nun li tuŝas min, ve!
Elfreĝ' min kaptas, doloras tre!

La patro ekspronas kun frosto en spin',
kaj premas la filon ĝemantan al sin',
li pene venas al hejmkort',
surbrake kuŝis la fil' en mort'.

Tradukis Kálmán Kalocsay

Ĝuu la someron !